





104-a jaro  
N-ro 342  
Septembro 2012



**“Kiom da Esperanto-libroj vi jam legis ĉi tiun jaron?  
Kiom da ili vi ankoraŭ intencas legi?”**

**Paulo Sérgio Viana**



**“Por akiri lertecon en la uzado de Esperanto, oni devas  
multe legi.”**


**Carlos Maria**



### Kovrilo

Sur la kovrilo troviĝas fotoj de BEL-Libroservo en brazilaj kongresoj de Esperanto.

- 03 Ĉefartikolo
- 04 Poemo: Casimiro de Abreu
- 05 Omaĝo: Neide Barros Rego
- 06 Literaturo: Julia Lopes de Almeida
- 10 Eventoj
- 12 Financa Raporto
- 14 Artikolo: Benedicto Silva
- 17 Kroniko
- 18 Forpaso



### Eldiro

*“Ĉi-semajne Esperanto fariĝas 125-jara. Se temas pri lingvo, ĝi estas ankoraŭ infano. Eble esperantistoj supozas, ke la lingvo jam estas sekura, ekster danĝero. Ĉu? Ĉu vi forlasus infanon je ĝia propra sorto? Ĉu vi ne plu zorgus pri ĝi? Nu, kian zorgon Esperanto bezonas? Simple, ke esperantistoj parolu Esperanton! Ke esperantistoj legu Esperantajn revuojn kaj librojn. Ne efikas propagandi lingvon kiun la propagandisto mem ne parolas. Nun, mi demandas vin: Kiom da Esperanto-libroj vi jam legis ĉi tiun jaron? Kiom da ili vi ankoraŭ intencas legi?”*

*Paulo Sérgio Viana skibis tiun mesaĝon la 26-an de julio 2012. Paulo estas kuracisto, tradukisto, eminenta brazila esperantisto, naskita en São Paulo, en la jaro 1948.*

**Revukunlaboraĵoj:** La ĉefredaktoro rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajtojn: **1-e:** Ne sciigi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko”, de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto” (2005) oni aparte klarigu per glossaro.

**Anonctarifo:** Tabelo pri prezoj (Brazilia Esperantisto) Onoj de paĝo (anoncoj)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj

**tutpaĝa** (19x25cm)  
4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora)  
2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00  
(nigra-blankaj)

**1/2 duonpaĝa** (9x24cm)  
R\$ 450,00 (kolora)  
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

**1/3 trionpaĝa horizontale**  
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)  
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

**1/3 trionpaĝa vertikale**  
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)  
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

**1/6 sesonpaĝa** (7.8x6.8cm)  
R\$ 150,00 (kolora)  
R\$ 100,00 (nigra-blanka)

# AĈETU KAJ LEGU LIBROJN!

**E**n la revuo Esperanto (oktobro 1962) troviĝas la jena demando: “Ĉu valoras peni dum jaroj verkante librojn, elspezi multe da mono presigante ilin, se finfine ili restos nelegite sur bretaro de vendejo, sen aĉetantoj?”

Evidente, la laboro de verkistoj kaj de eldonistoj nur valoras kiam okazas aĉetado kaj legado de libroj. Se ne, multaj seniluziigoj ilin trafos.

Ismael Gomes Braga asertas, ke “**la Esperanta literaturo donas al nia intelekto delikatajn ĝuoj, kiajn la esperantistoj ne povas eĉ imagi. Ni vivadas en intelekta sfero priluma ol la ordinara homo, ĉar ni ĝuadas la belon el ĉiuj mondpartoj, el ĉiuj kulturoj.**” Danke al Dio estas en nia movado miloj da valoraj libroj. La apero de bonaj libroj trudas respekton por nia lingvo. Estas en la esperantujo ankaŭ kompetentaj kaj talentaj verkistoj. Oni ne devas forgesi, ke sen libroj por ellerni kaj konservi la lingvon, nia movado ne pluvivos. Vi bone scias, ke la esperantistoj, kiuj pli bone scipovas Esperanton estas kutimaj legantoj de bonkvalitaj verkoj, precipe de la klasikaĵoj.

La eminenta sciencisto kaj esperantisto Charles Richet skribis antaŭ dekoj da jaroj la jenon: “**Helpu la aferon de Esperanto; se nenion alian vi povos fari, nu aĉetu lernolibron por du**

**frankojn kaj ĝin donacu al inteligenta amiko; vi samtempe helpos la eldoninton kaj vian amikon, sekve la aferon Esperanto.**”

Tiurilate, ni ripetas la demandojn faritajn de Paulo Sérgio Viana: “**Kiom da Esperanto-libroj vi jam legis ĉi tiun jaron? Kiom da ili vi ankoraŭ intencas legi?**” Niaj legantoj povas respondi al si mem, aĉetante kaj legante librojn vendatajn en la libroservo de BEL. La vendado de libro estas grava parto de la agado de Brazila Esperanto-Ligo. En nia BEL- Butiko (libroservo) vi trovas milojn da titoloj. Pere de la aĉetado de esperantaj libroj ni helpos la verkistojn, la eldonistojn kaj la asociojn kiel Brazilan Esperanto-Ligon.

Aliflanke, ni denove avertas la brazilan samideanaron pri la BEL-balotado, kiu okazos en januaro 2012, kadre de la 48-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Barra do Garças, ŝtato Mato Grosso. Ni esperas, ke laboremaj kaj sindediĉaj samideanoj kandidatiĝos. Atentu bone: la nunaj estraranoj ne deziras plu ofici.

Ni invitas vin, karaj legantoj, partopreni en la 48-a BKE. Ni certas, ke ĝi estos mirinda kaj brila evento. Cetere, Barra do Garças, situata apud la majesta rivero Araguaia, estas ĉarma kaj bela urbo kaj sia popolo afable akceptos nin.



**Brazila Esperantisto**

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser  
104-a jaro - Junio 2011 - N-ro 337

**Eldona Stabo**

**Respondeca ĵurnalisto:** Viviane Castro

**Ĉefredaktisto:** Eurípedes Alves Barbosa

**Ĉi-numeraj kunlaborantoj:** Benedicto Silva, Francisco Stefano Wechsler, Paulo Sérgio Vianna, Maria Eloá de Souza Lima

**Grafika aranĝo kaj enpaĝigo:** Viviane Castro

**Revizio kaj tradukado:** Eldona Komisiono

**Presejo:** Gráfica Sergipe (Brasília/DF)

Kontribuojn kaj mesaĝojn sendu al la retadreso de la ĉefredaktisto: euripedes-barbosa@ig.com.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Fondita en 1907

**Sidejo** SDS - Bloco P,36 - salas 301/303 - Ed. Venâncio III CEP 70393-902 - Brasília/DF

**Telefono** (0xx61) 3226 1298 **Fakso** (0xx61) 3226 4446

**Retadreso** bel@esperanto.org.br **Hejmpaĝo** www.esperanto.org.br

**Estraro**

**Prezidanto** S-ro Lício de Almeida Castro **Vic-prezidanto** S-ro Eurípedes Alves Barbosa  
**1-a Sekretario** S-ino Sufia Alves de Lima **2-a Sekretario** S-ro Carlos Alfredo Aragón Guerreiro  
**3-a Sekretario** S-ro Devanizio Apolinário dos Santos  
**Financa Direktoro** vaka. **Kasisto** S-ro Darci Gomes Sardinha

**Kontrola Konsilantaro**

Aymoré Vaz Pinto, José Carlos Dorini Ramos, Adolpho de Miranda Silva, Lia Milhomem Moreno, Cteio Galvão da Silva, Evandro Ferreira de Avellar

**Federacia Konsilantaro**

**Prezidanto** S-ino Maria das Dores Góes

**Komitato de A** Paulo Nascentes

**Ĉefdelegito de UEA** James Rezende Piton

# Miaj ok jaroj

Casimiro de Abreu

Tradukis Maria Eloá de Souza Lima, el Jataí, Goiás.

Ho! kiom da saŭdado mi sentas

De l' aŭroro de mia vivo,

De mia infanaĝo tre kara

Kiun la jaroj ne redonas!

Kiom da amo, kiom da revoj, kiom da  
floroj.

Kiaj noktoj de melodioj!

En tiuj dolĉaj vesperoj

Ĉe la ombro de l' bananujo,

Aŭ sub la granda oranĝarbejo...

Kiaj estas belaj la tagoj

De nia komenca ekzistado!

Spiras l' animo korpurecon

Kvazaŭ parfumojn la floroj.

La maro - estas lago serena,

La ĉielo - blua mantelo,

La mondo - orluma revado,

La vivo - glorkanto de amo!

Kiaj aŭroroj, kia suno, kia vivo,

Kiaj noktoj de melodioj,

En tiel milda ĝojeco,

En tiu naiveca plezuro!

La ĉielo broderita de steloj,

La tero plena de aromoj,

La ondo kisas la sablon

Kaj la luno kisas la maron!

Ho! tagoj de mia infaneco!

Ho! mia printempa ĉielo!

Kia bona la vivo estis tiam.

Dum tiuj senzorgaj matenoj  
Ne okazis ĉagrenoj, malĝojoj...

En tiu tempo mi havis

De la patrino karecojn

Kaj kisojn de la fratino!

Libera filo de l' montoj

Mi foriras tre kontenta,

Malbutenita ĉemizo,

Piedoj senŝuaj, brakoj nudaj,

Mi kuris tra ebenaĵo,

Proksimiĝante al kaskado,

Persekutis la rapidajn

Bluajn, belajn papiliojn!

Dum tiu feliĉa tempo,

Mi iris rikolti pitangojn,

Grimpis por preni mangojn,

Ludis sur bordo de l' maro.

La anĝeluson mi preĝis,

La ĉielo ĉiam estis bela,

Mi ridetante dormis

Kaj vekiĝis kantante ĝoje...

# Eminentaj virinoj en la Brazila Esperanto-Movado

NEIDE BARROS REGO



Neide kaj Carlos Maria.

**N**i devas surgenuje danki al la ĉarma kaj bela samideanino Neide Barros Rego pro ĉio, kion ŝi faras por Esperanto. Neide estas talenta kantistino, deklamistino, poetino kaj sindediĉa esperantistino.

Ŝi naskiĝis en la urbo São Tomás de Aquino, ŝtato Minas Gerais, la 18-an de oktobro 1938. En 1951, ŝia familio translokiĝis al la ŝtato Rio de Janeiro, kie ŝi diplomiĝis instruistino kaj faris kelkajn kursojn pri Administrado. Ŝi fariĝis oficistino de la ŝtata Deputitejo, en 1958, per konkurso. Neide diplomiĝis pri Deklamado en 1964, sed instruis ĝin ekde 1961 en la Kultura Centro Maria Sabino, kiun ŝi fondis kaj estras nun. En tiu institucio ŝi plenumas kulturajn eventojn.

En 1994 Neide organizis poezian antologion (portugallingvan) kaj, en 2004, verkis sian unuan libron de poemoj. Nia kara samideanino apartenas al diversaj beletraj akademioj kaj jam ricevis plurajn premiojn pro siaj originalaj poemoj, interalie de UEA, en 2005 kaj en 2006. Ŝia vidbendo "Neide Deklamas" ankaŭ estis premiita.

Nia talenta esperantistino tradukas en Esperanton, poezie kaj proze. Por ekzemplo: ŝi esperantigis la libreton "La Adiaŭo de la Armiloj", de Salvador Borges. Neide ankaŭ komponis muzikon por la poemo "Ho, mia kor' ", de Zamehof, jam aperinta en KD kaj en la DVD "Neide Kantas".

Neide eklernis Esperanton en 1991 kaj estis invitita deklami kaj kanti en Esperanto pro sia bela interpretado. Ŝi deklamis en naciaj kongresoj kaj en universalaj kongresoj, jene: Vieno (1992), Montpellier (1998) kaj Fortaleza (2002).

Ŝi estas dumviva membro kaj fakdelegito de UEA, kaj ankaŭ honora civitano de la urbo Niteroi, kie ŝi loĝas.★

# La tri fratinoj

Júlia Lopes de Almeida

Tradukis Francisco Stefano Wechsler

Al Zalina Rolim

B  
r  
a  
z  
i  
l  
a

E  
s  
p  
e  
r  
a  
n  
t  
i  
s  
t  
o

**J**am de antaŭ multaj jaroj S-ino Teresa ne renkontis siajn du fratinojn. La dua, S-ino Lucinda, forvojaĝis tuj post sia edziniĝo, kun la unua edzo, al Bonaero, kaj tie loĝadis; la plej juna, S-ino Violeta, transloĝiĝis al Bahio kun sia edzo kaj tie ĝuadis la fakultatajn triumfojn de la filoj kaj la delikatajn salutojn de sia *maljunulo*<sup>1</sup>.

Sed unu tagon S-ino Teresa, maltrankvila, timante la morton jam najbaran, leterpetis siajn fratinojn:

6

— Ke ili venu Rion adiaŭi ŝin kaj ekposedi siajn apartenaĵojn.

N  
r  
o

Profitamo aŭ resopiro... (kiu scipovas deĉifri tiel lerte kaŝitajn korojn?) pelis la du sinjorinojn al ilia naskiĝloko.

3  
3  
7

S-ino Teresa rejuniĝis je kelkaj tagoj. Nur ŝi daŭris fraŭlino, en la domo de sia gepatroj, jam delonge mortintaj, kiel fidela gardisto, prizorganta ĉiujn relikvojn el la junaĝo de la gepatroj kaj de la fratinoj! Tial ŝi ordonis al la mastrumistino:

J  
u  
n

— Atentu, Emília! por franjo Lucinda aranĝu la bluan ĉambron, tiun ĉe la domangulo... ĝi estis ŝia fraŭlina ĉambro... Ŝi amis kanariojn... ĉiam havis birdkaĝon en la ĉambro... jen do: metu tien la orumitan kaĝeton kun la juna kanario... Aŭskultu! Ĉion zorge lavu! Ŝi estis tre koketa... ne forgesu pudron, fajnan sapon kaj boteletojn da... atendu! kian odoron ŝi preferis?... Ha! mi ekmemoris! jasmenan! aĉetigu jasmenesencon...

2  
0  
1  
1

— Jes, sinjorino.

— Nu, por sinjorino Violeta, pretigu la blankan ĉambron, tiun kun tri fenestroj... Ĝi estis la ŝia! Provizu ĝin per multaj floroj... Violeta estis mia ĝardenistino!... Jen, pretigu bukedon por la lavujo, alian por la komodo. Tiele ŝi aranĝis... Atendu! kia hasto! Aĉetigu violesencon... ĝi estis ŝia parfumo!

— Jes, sinjorino.

— Nenion forgesu!

— Jes, sinjorino...

La mastrumistino eliris, kaj S-ino Teresa restis kriĉanta pro astmatako. Ŝi ne volis morti

<sup>1</sup> Karesnomo por maljuna edzo.

fordoninte tiun domon al indiferentaj manoj. Nur la fratinoj ame ricevos tiujn antikvajn meblojn, kie multfoje ili kune ruliĝis, kie la gepatroj superrigardis iliajn petolaĵojn de infanoj, kaj kie, poste, la fianĉoj kisis ilin ekstaze... La kompatinda malkomponiĝis, sentis, je ĉiu tusanhele, ke diseriĝas sub la seka kaj sulkoplena haŭto ŝia malfortika kaj dolora skeleto. Ŝia korpo, neniam amita, faladis, kiel fasko el rompitaĵoj, en tombon. Kiel aspektas la fratinoj? Lucinda certe jam tre maljuniĝis! Kaj Violeta, kvankam malpli aĝa, tamen, pro tiom da gefiloj, probable alvenos tremanta kaj tre malsana de maljuno! Jam de antaŭ proksimume tridek jaroj ŝi ne vidas ŝin... kaj la alian... de antaŭ minimume kvardek! Kaj S-ino Teresa revidis la belan kaj palan vizaĝon de la svelta Lucinda, kun verdaj okuloj, perfektaj dentoj, neĝblankaj vangoj; kaj la vizaĝeton de Violeta, brunhaŭtan, iomete rozkoloran, kun nigraj kaj petolaj okuloj kaj buŝeto parfumita de junaĝo, tre freŝa kaj ruĝa!

Kaj, kvankam bildigante iliajn haŭtsulkojn, ŝi vidis antaŭ si la vivplenajn kaj gajegajn figurojn de la pasintepokaj fratinoj...

La mastrumistino ĉion pretigis zorgege. S-ino Teresa, apogante sin sur ŝia ŝultro kaj sur sia dika lambastono, trairis la tutan domon. Ŝi ĉiam havis la strangan manion teni ĉiujn objektojn en la samaj lokoj kaj samaj pozicioj. Kiam ŝi ordonis renovigon de murpapero en ĉambro, ŝi postulis, ke la nova estu precize egala al la antaŭa; la mebloj estis poluritaj, la ŝtofoj pedante senpolvigataj, kaj la tapiŝojn oni neniam anstataŭigis per aliaj ne havantaj la saman koloron kaj la saman desegnon... Por ŝi, tiuj antikvaĵoj estis raraj valoraĵoj. Ŝi neniam elhejmiĝis, neniam festis. Ŝvebis en la aero de la ĉambroj ŝimodoro, perfidanta la malgajan izolitecon de ŝia fraŭlina vivo, sen nevoj, sen baptofiloj, sen iu ajn!

Estis por ŝi malfacile fordoni tiun tutan trezoron al fremdaj manoj, kaj ŝi avide atendadis la fratinojn. Koincide, alvenis samtage S-ino Violeta, el Bahio, kaj S-ino Lucinda, el Bonaero.

La mateno estis senkompare bela; la ĉielo plenbluis, la aero varmetis, kio plaĉis al S-ino Teresa, ĉar ŝi povis vesti sin pli malpeze kaj kruĉmeti sur la violan silkrobon sian belegan manteleton el nigra punto. Ĉiuj vestoj kunproduktis odoron de malseko. Robo tiom longe entenata, kiel perfidis ĝiaj profundaj sulkoj, ne povus odori je suno aŭ printempo...

Sur la supro de la ŝtuparo, kun sia kapeto senĉese tremjesanta, per unu mano apogita sur la bastono kaj kun la alia kaŝita sub brako de la mastrumistino, S-ino Teresa atendis la fratinojn kun brilaj kaj larmoplenaj okuloj. Ili supreniris, ankaŭ malrapide, parolante laŭte, unu per basa voĉo, la alia per harmonika akuto. Certe temas pri ridetoj, rememoroj pri la junaĝo...

S-ino Teresa jam ordonis, ke oni malfermu la ĉefsalonon, kaj tuj iris tien la tri. Kaj ŝi ja rimarkis, kun iom envia ĝojo, ke la fratinoj paŝas pli rektadorse, ne bezonante apogilon. S-ino Lucinda glimis pro la vestovitraĵetoj, kuŝigante sian kolgrason sur la kostan, nigran silkon de la mantelo. Ŝi estis dikega. La graseco maskis ŝiajn haŭtsulkojn. La junaĝa koketo ankoraŭ montris restaĵojn: jen la tinkturita hararo, diskombita al la tempioj per du bukloj, laŭ la hispana maniero.

Kaj de tempo al tempo eksaltetis iu *caramba*<sup>2</sup>, kiu eksplodis kiel bombo en tiu antikva kaj severmora domo.

S-ino Violeta, aliflanke, konservis iom de sia florodoro por la sekeco de maljunaĝo. Ŝi estis etkreska, tre sulkoplenta; ŝi surhavis brunlanan robon, kun ŝpare ornamita mantelo. Ja graciaĝis ŝin la tre blanka hararo kaj la tenero de la nigraj okuloj, kutimantaj rideti al la petolemaj genepoj.

S-ino Teresa estis la plej maljunaspekta! Mankis al ŝi amo, mankis al ŝi la sanktaj ango-roj de patrineco, kaj ŝia pasiva, enmemiĝa, senmova vivo kondukis ŝin al tiu stato de velka sekvinbero.

La tri fratinoj rigardis unu la alian malgaje; sed kion ili pensis, tion ne diris. La lipoj ridetis, okazis kelkaj duonkaŝitaj suspiroj kaj larmobriilo, kiu ŝajnis malsekigi samtempe ĉies okulojn, rulante sur nenies vango... S-ino Lucinda rompis la silenton. Ŝi venis por mallonga restado... ŝia dua edzo, argentinano, mortis antaŭ unu jaro; ankoraŭ restas multo likvidota... Sian palaceton ŝi neniel fordonos al la manoj de siaj malicaj vicfiloj... Sian palaceton! Kiom ŝi fieris, priskribante per tiuj du vortoj la lukson de siaj mebloj kaj de sia ekipaĵaro...

Ŝi estas konata kaj enviata tra la tuta urbo!

S-ino Teresa ekmiris:

— Kio! do viaj mebloj superas...

— Ĉi tiujn?! Ho! Kaj ŝi ridis malestime. Teresa! vi ne komprenas: ĉio ĉi estas malbelega! *Nosotros*<sup>3</sup> posedas modernaĵojn, venigitajn el Parizo! Mia edzo elspezis ĉiujare sumegon por pentraĵoj, por porcelanoj, por ĉevaloj kaj por vestoj!

S-ino Teresa, pala, kun ankoraŭ tremanta kapeto, rigardis al sia fratino Violeta.

— Kaj vi?

— Al mi jam ne gravas lukso... miaj genepoj ĉion detruas! Krom frekventi meson, mi iras nenien... Mi ja volas havi vastan spacon por la infanoj kaj belan kapelon. En mia hejmo oni ĉiam celebras, iom pompe, la monaton *Marto*<sup>4</sup>... Jen nia sistemo.

— Sen modesteco, mi ne konas pli kompletan domon ol la mian! fanfaronis S-ino Lucinda.

— Nek mi pli gajan hejmon ol la mian. Se mi foriras, mi tuj revenas resopire... murmuris S-ino Violeta.

S-ino Teresa, jam hontante, ke ŝi familiare nomas siajn fratinojn, diris, per ceremonia kaj timema tono:

— Do mi ordonis, ke oni petu... vin ambaŭ... prizorgi la meblaron kaj la domon, supozante,

2 [karamba]. Kastilie kaj portugale: sakrorigina ekkrio montranta surpriziĝon.

3 Kastilie: ni.

4 *Marto* estas, laŭ katolika tradicio, la monato dediĉita al la Sankta Virgolino Mario.



ke tio plaĉos al vi...

— Ni vidu! interrompis S-ino Lucinda, levante sin kun lerte kaŝita peno. Emília subtenis S-inon Teresa, kaj ĉiuj pluiris en pilgrimado. S-ino Lucinda ĉion palpis kaj murmuris:

— Ĉi tiu meblaro havas putran ŝtofon... Rigardu! kaj ŝi disgratis unge la damaskon de la foteloj.

— Efektive... konfirmis S-ino Violeta. Ĉio statas same: tiu ĉi kanapo estas terura; mi ne uzus ĝin eĉ en mia kuirejo! Dio mia! tiu ĉi manĝoĉambro ŝajnas al mi monaĥineja manĝosalono!... Nekredeble, ke pratempe ni opiniis ĝin bela...

S-ino Violeta ridetis; S-ino Teresa ne ploris pro honto, pro respekto al siaj fratinoj, havantaj aliajn kutimojn kaj aliajn gustojn, ĉiu edukita de sia edzo, kun menso influata de lia menso; unu amegis lukson, la alia sian familion kaj la eklezion. Estis nedubeble, ke la edziniĝo kaj la distanco forŝtelis de ŝi la fratinojn por ĉiam; la pratempaj Lucinda kaj Violeta kuŝis enterigitaj en iu tombejo por virgulinaj; tiuj du maljunulinoj kun malaj temperamentoj... ne estis ili!

Vespere, S-ino Teresa, sufokate de astmo, ne volis frue retiriĝi en sian ĉambron. Emília venis al ŝi, dirante per ironia tono:

— S-ino Lucinda ordonis, ke oni forportu el ŝia ĉambro la birdkaĝeton. Ŝi diris, ke ŝi ne eltenas bruon... ke la matena dormado estas la plej plezura.

Samtempe venis S-ino Violeta kun la floroj enmane:

— Ĉi tio nepre ne restu en mia ĉambro... Floroj restu en ĝardenoj... Jen la procedo en mia hejmo.

En mia hejmo! pensis S-ino Teresa; en mia hejmo! finfine ĉiu amas sian propran, pensas pri la sia! Mi, nur mi, amas ĉi tiun domon, ne ĉar ĝi estas mia, sed ĉar ĝi estis nia... Ĉu mi estas pli bonkora ol ili? El kie fontas tiu ĉi tenero kaj tiu ĉi resopiro, ne sentataj de ili?

S-ino Teresa ploris en la duonombro de la ĉambro.

La sekvan tagon ŝi ordonis, ke oni metu en la ĉambron de senvaloraĵoj, ĉe la fundo de la malantaŭa korto, la plej antikvajn kaj plej ŝatatajn meblojn. La fratinoj ĉion primokis... nu, do! ŝi skribordonos, ke per ili oni faru stakfajron en ŝia mortotago! Sed ŝi nenion skribis, kaj post du tagoj, je la tagmanĝa horo, ŝi mortis sidante en sia ledseĝo, kun la manoj kaŝitaj sub ŝalo kaj la kapeto brusten klinita.

S-ino Violeta kolektis la figurojn de la sanktulŝranko, kiel piajn memorigaĵojn; S-ino Lucinda prenis nenion.

Ili vendis la domon, disdividis la posedaĵojn... kaj ĉiu foriris al sia destino.

Fonto: *Ânsia eterna* (Eterna angoro). Rio: Editora S. A. A Noite. 1940? 270 p.★

# Neforgesebla Renkontiĝo en Catalão



Sesdek esperantistoj aliĝis por partopreni en la Unua Centrokcidenta Renkontiĝo de Esperanto, en la urbo Catalão, ŝtato Goiás, de la 6-a ĝis la 8-a de julio 2012. La evento estis vera sukceso. Ĉiuj aranĝoj okazis en la aŭditorio de la Federacia Universitato de Goiás. La ĉeftemo estis “Esperanto - movado en la centrokcidenta regiono”.

Paulo Nascentes Pereira prelegis pri la ĉeftemo kadre de la solena malfermo, kiam okazis ankaŭ omaĝo al René Ethienne Anestorine Deckers, pioniro de Esperanto en Catalão. La 7-an de julio, okazis prelegoj dum la tuta tago, jene: **“La rolo de Brazila Esperanto-Ligo en la disvastigado de Esperanto”**, prelegis Lício de Almeida Castro, prezidanto de BEL; **“Interreta instruado de Esperanto”**, prelegis Carlos Pereira; **“Miaj spertoj en la E-movado, ĉefe dum internaciaj vojaĝoj partoprenante en esperantaj eventoj”**, paroladis Joaquim João Mariano, vicprezidanto de Esperanto-Asocio de Gojaso; **“Realigo kaj planoj de Esperanto-Asocio de Brasília favore al nia movado en Centrokcidenta Regiono”**, paroladis Maria das Dores Góes, prezidantino de EAB; **“Realigoj kaj planoj de Sociedade de Esperanto de Mato Grosso do Sul favore al nia movado en la Centrokcidenta Regiono”**, prelegis Rogério Peres Guttierres; **“Kiel organizi Esperanto-institucion en Mato Grosso kaj kiel disvastigi pli bone nian lingvon**

en tiu ŝtato”, paroladis **Ciro Gomes de Freitas**.

Ankoraŭ en la 7-a de julio, okazis arta vespero kun la prezentado de “Orchestra de violões Nova Vida” (Gitara Orkestro Nova Vivo). Kia agrabla surprizo la prezentado de tia infana orkestro! Poste, Priscila Sardinha dancis kaj Fernando Sardinha ludis gitaron. En la fino, Amarílio Hévia de Carvalho rolis la monologon **“Joaquim José – fidoplena martiro.”**

Sub la kunordigado de Evandro Ferreira de Avellar, prezidanto de Taguatinga Esperanto-Klubo, oni plenumis, la 8-an de julio, matene, la debaton pri la ĉeftemo de la Renkontiĝo. Rezultis pluraj ideoj pri la disvastigado de Esperanto en la Centrokcidenta Regiono. En la estonta numero, “Brazila Esperantisto” detale pritraktos la aferon.

Rimarkinda estis la riĉeco de la tuta evento. La partoprenantoj ĝuis altnivelan Renkontiĝon. Gratulojn al la lokaj organizantoj, kiuj kompetente laboris por la sukceso de la evento. Prezidis la organizan komitaton nia senlaca samideanino Helena das Graças Oliveira Silva. ★

# Argentina Kongreso de Esperanto

**A**rgentina Esperanto-Ligo anoncas la okazigon de Argentina Kongreso de Esperanto, de la 6-a ĝis la 7-a de oktobro 2012, en Bonaero.

Kongrestemoj: “Amikeco kiel ponto al la paco, amikeco kaj evoluigo”; “Regiona integriĝo: turismo kaj ekonomio”.

Aliĝoj: <https://eventioz.com/events/congreso-argentino-de-esperanto-octobre-2012>

Kiel pagi? Petu informojn al: [sekretario@esperanto.org.ar](mailto:sekretario@esperanto.org.ar)

HELPA FONDUSO: estas planata la starigo de helpa fonduso por subvencii laŭbezone tute aŭ parte la vojaĝon kaj restadkostojn en Bonaero de tiuj enlandaj partoprenantoj, kiuj nepovante pagi siajn vojaĝbiletojn aŭ gastigkostojn, sufiĉe frue antaŭanoncu sian intencon partopreni kaj petu helpon, ĉiam laŭ la disponebla mono. Por gastigi ilin en Bonaero la organiza komitato klopodos trovi adekvatan malmultekostan loĝejon, aŭ eĉ, se eble, senpagan loĝejon.

Ĉiuj kiuj volas prelegi, proponi programerojn aŭ iel kunlabori estas petataj kontakti nin kiel eble plej frue retroŝte al [sekretario@esperanto.org.ar](mailto:sekretario@esperanto.org.ar) aŭ telefone al (011) 15 50 61 05 96. ★

# FINANCA RAPORTO

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

CNPJ 00.406.504/0001-06

BALANÇO PATRIMONIAL EM 31 DE DEZEMBRO

**ATIVO**

CIRCULANTE

DISPONIBILIDADES

	Ano 2011	Ano 2010
Caixa.....	3.240,37	12.280,89
Bancos conta movimento.....	10.724,04	24.036,90
Bancos conta aplicação.....	4.458,39	1.125,87

ESTOQUES

Estoque de produtos para revenda.....	260.949,14	259.980,31
---------------------------------------	------------	------------

REALIZÁVEL A CURTO PRAZO

Duplicatas a receber e devedores diversos.....	52.702,34	48.293,59
--	-----------	-----------

VALORES TEMPORÁRIOS

Representação de Jornais e Revistas - UEA.....	0,00 (a)	23.301,31
Cartão de crédito.....	3.901,88	5.467,95
Adiantamento para Fornecedores.....	0,00	925,00

PERMANENTE

IMOBILIZADO

Imóveis.....	171.883,56	171.883,56
Depreciação s/imóveis.....	(27.501,36)	(27.501,36)
Computadores, periféricos, aparelhos de vídeo e som.....	103.117,19	103.117,19
Depreciação s/computadores, periféricos, aparelhos de vídeo e som.....	(78.008,17)	(78.008,17)
Móveis e utensílios, equipamentos e instalações.....	66.610,46	66.610,46
Depreciação s/móveis e utensílios, equipamentos e instalações.....	(31.066,24)	(31.066,24)

TOTAL DO ATIVO

541.011,60      580.447,26

**PASSIVO**

CIRCULANTE

OBRIGAÇÕES COMERCIAIS

Recebimentos a favor de terceiros.....	41.216,72 (b)	67.584,83
Fornecedores.....	30.129,71	29.899,09

EMPRÉSTIMOS E FINANCIAMENTOS

Empréstimos e financiamentos diversos.....	6.062,10 (c)	0,00
--	--------------	------

CREDORES DIVERSOS

Credores diversos.....	82.114,41	73.118,31
------------------------	-----------	-----------

PATRIMÔNIO LÍQUIDO


FUNDO SOCIAL E RESERVAS

Fundo Brasília Esperantista.....	6.619,15	6.619,15
Fundo Almada.....	7.695,28	8.067,28
Reserva para realização de congressos.....	27.013,73	26.703,73
Exercícios anteriores.....	368.454,87	394.271,31
Resultado do exercício.....	(28.294,37)	(25.816,44)

TOTAL DO PASSIVO

541.011,60      580.447,26

Brasília, 09 de abril de 2012

  
Contat Contab. Ass. Tec. Ltda.  
CRC-DF 0824/0

  
Lício de Almeida Castro  
Presidente

Notas explicativas e parecer do Conselho Fiscal no verso

B  
r  
a  
z  
i  
l  
i  
a  
  
E  
s  
p  
e  
r  
a  
n  
t  
i  
s  
t  
o

12

N  
r  
o

3  
3  
7

J  
u  
n

2  
0  
1  
1

1

**Notas explicativas do Balanço Patrimonial da Liga Brasileira de Esperanto**

- (a) Conta sem movimentação, cujo saldo foi transferido, em janeiro de 2011, para a conta "Associação Mundial de Esperanto - UEA" do grupo "Recebimento a favor de terceiros". A unificação foi feita para facilitar o controle contábil do relacionamento da Liga com a Associação Mundial de Esperanto.
- (b) Entre outras contas, inclui valores recebidos para BEJO (saldo em 31.12.2011= R\$ 10.907,00).
- (c) Valores emprestados por diversos, inclusive membros da diretoria.

**Parecer do Conselho Fiscal**

Nós, membros do Conselho Fiscal da Liga Brasileira de Esperanto, tendo examinado o Balanço Patrimonial do exercício de 2011, impresso no anverso deste documento, totalizando R\$ 541.011,60 (Quinhentos e quarenta e um mil, onze reais e sessenta centavos) no "ATIVO" e o mesmo valor no "PASSIVO", e tendo julgado o mesmo correto, com as notas explicativas acima, somos de parecer que as contas da Liga Brasileira de Esperanto referentes ao período de 1º de janeiro a 31 de dezembro de 2011 devam ser aprovadas pela Assembleia Geral Ordinária, a ser realizada durante o 48º Congresso Brasileiro de Esperanto, em janeiro de 2013, na cidade de Barra do Garças, MT.

Brasília, 9 de abril de 2012

  
Adolpho de Miranda Silva

  
Aymore Vaz Pinto

  
José Carlos Dorini Ramos

B  
r  
a  
z  
i  
l  
a  
  
E  
s  
p  
e  
r  
a  
n  
t  
i  
s  
t  
o

13

N  
r  
o

3  
3  
7

J  
u  
n

2  
0  
1  
1

# Tributo da laŭdo kaj danko al mia karmemora edzino

Benedicto Silva

Laŭlonge de mia esperantista vivo mi konis plurajn homojn, kiuj fervore propagandis la ideon de internacilingvo, ĝenerale, kaj de Esperanto, aparte, eĉ ne sufiĉe posedante la lingvon kreitan de Zamenhof.



14 El tiuj homoj, unu, kiu plej impresis min pro sia fervoro kaj konvinkiteco estis mia karmemora edzino Maria Stella, forpasinta antaŭ nelonge, precize je la 23-a de marto ĉi-jare.

Ŝiaj nesufiĉa sciado de la gramatiko kaj modesta provizo da Esperantaj vortoj tute ne malebligis al ŝi la legadon de facilaj tekstoj de nia literaturo, ĉu nacia, ĉu internacia. Al ŝi tre plaĉis interalie la fabeloj de la fratoj Grimm tradukitaj en la fluan lingvaĵon de D-ro Kabe. Ŝi ofte legadis tiujn fabelojn sen konsulti vortaron, kaj plurfoje ŝi eĉ komentis kelkajn pecojn el ili aŭ petis de mi klarigojn, precipe pri gramatikaĵoj...

Plurfoje, kiam ŝi entuziasme parolis ĉe amika rondo pri la rolo de Esperanto en la komunikado de diversnaciaj homoj, se oni petis de ŝi kvazaŭan specimenon de la prononco de Esperanto, ŝi tuj recitis du preĝojn kiujn ŝi jam de longe sciis parkere, nome, **Patro Nia** kaj **Saluton, Maria...** Kaj tion ŝi faris entuziasme, eĉ pie, kvazaŭ ŝi intence enmetas en la recitadon siajn animon kaj koron por elmontri la belsonecon de Esperanto... Ĉu ŝi faris tion nur pro sia amo al Esperanto aŭ ankaŭ pro sia fervora religia kredo? Iel ajn, ŝia sincera sindonemo al la homaraj demandoj, ĉu transcendaĵoj, ĉu ordinaraj, estis ĉiam travidebla en ŝia ĉiutaga vivo...

Ankoraŭ pri ŝiaj intereso kaj emo prui al neesperantistoj ne nur la facilecon, sed

ankaŭ la belsonecon de Esperanto, Maria Stella kutime deklamis, hejme aŭ ĉe E-kun-  
sidoj, la unuan strofon de la poemo **Pluvo** de Zamenhof:

*Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas  
Senĉese, senfine, senhalte,  
El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'  
Are gutoj frapiĝas resalte.*

Se paroli ankaŭ pri ŝia aparta sentemo al la Esperanta beletro aŭ muziko, ŝi forte emociiĝis, ĉu aŭdante, ĉu kunkantante, ĉe E-kongresoj, la himnon **La Espero** aŭ aliajn kantaĵojn. Mi ne forgesas kiel forte ŝi emociiĝis, ekzemple, aŭdante je la unua fojo, mi ne memoras kie kaj kiam, per la ĉarma voĉo de Neide Barros Rêgo, sian tre ŝatatan kanton **En malproksimo** de Bittencourt Sampaio, laŭ muziko de la brazila komponisto Carlos Gomes.

Mi ne povas ne registri ĉi tie la varman, sinceran admiron kun kiu Maria Stella ofte parolis al niaj amikoj ne nur pri la muzika talento de Neide Barros Rêgo, sed ankaŭ pri ŝiaj ĉarmoj... Ĉiufoje, kiam mi montris al ŝi leteron, retmesaĝon aŭ novan verkon de Neide, ŝia unua demando estis: —“ De la ĉarma Neide?!”

Unu el la plej karakterizaj trajtoj de mia karmemora edzino estis la sincereco. Mi povas doni kiel ekzemplon de ŝia sincereco la jenan okazintaĵon, kiu ne estis rara:

Pluraj amikoj ofte demandis ŝin: “Stella, kial vi ankoraŭ ne havas plenan posedon de Esperanto, kvankam vi estas edzino de Benedicto jam de tre longa tempo? Li estas sperta esperantisto, ĉar li memlernis la internacian lingvon antaŭ pli ol duonjarcento! Tagnokte vi havas apud vi tiun spertan esperantiston!” Kaj ŝi ĉiam senhezite respondis: “Benedicto estas ja sperta esperantisto, sed malbona, tre malbona instruisto!”

Miaopinie, ŝi pravis. ŝi pravas!

Se unuflanke mi, mia familio kaj pluraj amikoj priploras la forpasintan edzinon, patrion, avinon kaj amikion, aliflanke ni ĝojas, memorante la plurajn momentojn de amo kaj amikeco, kiujn ŝi ĉiam sentigis al ni ĉiuj.

Alia kurioza karakterizaĵo de ŝia personeco estis ŝia profunda amo al Brazilo. Kvankam filino de fremdlandaj gepatroj (libanano kaj italino), Maria Stella tre amistan landon, ties kulturon, ties tradiciojn kaj, super ĉio, la tipe nacian muzikon, temantan pri la brazilaj homo kaj naturo, pri la pasia sentemo de nialandaj kamparanoj...

Preskaŭ ĉiutage, ordinare posttagmeze, ŝi sidis longan tempon sur sofo, silente brodante donacotajn mantukojn aŭ aliajn tolojn. Dum tiu silenta manlaboro ŝi aŭskultadis siajn preferatajn kantojn registritajn sur dekoj kaj dekoj da bendoj kaj disketoj. Ŝi estis profunde romantika virino... Ŝi vere amis nian landon...

Ŝia ekumena animo manifestiĝis ĉiufoje, kiam oni invitis ŝin al ceremonioj de tiu aŭ alia religio. Ŝi ĉiam diradis, ke estas nur unu Dio, unu

Mondo kaj unu Interlingvo, aludante la konatan devizon de Oomoto, japana spiritualisma religio.

Kiel jam dirite, kvankam ŝi ne estis aktiva esperantistino, nek spiritistino, ŝi tamen tre admiris la mondfaman mediumon Francisco Cândido Xavier kaj la eminentan brazilan esperantiston kaj spiritiston Ismael Gomes Braga. Antaŭ ĉirkaŭ du jaroj, neniuj aliaj amiko aŭ familiano, krom Maria Stella, sukcesis treni min en kinejon por spekti kun ŝi la filmon pri la vivo de tiu mediumo.

Poste, ŝi tre ĝojis, kiam mi diris al ŝi, ke D-ro Eurípedes Alves Barbosa petis min sendi al li malnovajn leterojn, kiujn mi ricevis de Ismael Gomes Braga dum preskaŭ 20 jaroj. Tiujn leterojn D-ro Eurípedes intencis publikigi libroforme, kune kun aliaj skribaĵoj (recenzoj kaj artikoloj) de Ismael G. Braga en bela volumo, kiu efektive jam aperis sub la titolo **Neforgeseblaj skribaĵoj de Ismael Gomes Braga**. (Bedaŭrinde, la ekzempleron ĝentile donacitan al mi far D-ro Eurípedes mi enmanigis preskaŭ tri monatojn post ŝia forpaso...) Mi bone memoras, ke ŝi laŭdis siatempe la grandanimecon de Ismael Gomes Braga, kies leterojn ŝi ĉiam plezure legis...

Pluraj eksterlandaj gesamideanoj konatiĝis kaj amikiĝis kun mia edzino. El ili, la lasta, kun kiu ŝi rilatis, estis mia sveda amikino Kerstin Rohden, ĉe la UKO en Kopenhago, en julio 2011. Kun Kerstin mi kaj Maria Stella pasigis neforgeseblajn momentojn...

Metante finon al ĉi tiuj fragmentaj rememoroj pri mia edzino, mi sincere konfesas, ke ĉian sukceson, kiun mi atingis en la vivo, mi ŝuldas plejparte al ŝiaj konsiloj, al ŝia pozitiva kaj morala apogo, al ŝia ekzempla sinteno en la hejmo kaj ĉe sociaj rondoj, dum ĉiuj momentoj de nia longa kaj feliĉa geedza kunvivado... Por ĉio, mi estas eterne danka al ŝi. ★

---

**Klarigo pri la foto:** Maria Stella kaj mi ĉe gaja interparolo kun nia komuna amiko, la karmemora beletristo Sylla Chaves, ĉe la kadro de la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto en Rio-de-Ĵanejro, Julio 2007.



# Brazila Kroniko

## Kio okazas en via Regiono?

### Florianópolis havas Esperanto-klubon.



**K**iam oni festis en la 26-a de Julio 2012 la 125-an datrevenon de oficiala komenc-punkto de la lingvo Esperanto, estis kreita ESPERANTO-KLUBO DE FLORIANÓPOLIS, en la ĉefurbo de la Ŝtato Sankta Katarino, Brazilo.

Ĉeestis dek-naŭ da homoj, instruistoj kaj lernantoj de Esperanto kaj familianoj, kiuj kunvenis en frata etoso por doni al la Esperanto-Movado novan ilon por la disvastigado de la internacia lingvo Esperanto.

La ĉeestantoj elektis la unuan Estraron de ESPERANTO-KLUBO DE FLORIANÓPOLIS: Prezidanto ANTONIO FELIX DA SILVA; Vic-Prezidanto JOSÉ SARTORI CHAVES BURGER; Sekretariino MARTHA OLIVEIRA RIBAS; Kassistino SENILDE BRAGA GURJÃO; Direktoro de Komunikado: NILTON CÉSAR GÓES; Direktorino de Komuna Propraĵo: MÍRIAM JUSTINO; Konsilantaro: AIRTON JOSÉ DE FARIA, SIMONE SILVA DOS SANTOS e ANTÔNIO DE PÁDUA MELLO MOREIRA DE SOUZA.

### Premio Deguĉi al Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia



**G**es-roj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia ricevis la ĉijaran **Premion Onisaburo Deguĉi**. La Estraro de UEA aljuĝas tiun "esperantistan pacpremion" pro agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de D-ro L.L. Za-

menhof kaj Onisaburo Deguĉi. La Premio estis starigita en 1987 per donaco de Oomoto; ĝi konsistas el diplomo, monsumo de 2000 eŭroj kaj donaceto de Oomoto.

El la blogo:

<http://esperantomovado.blogspot.com.br>

### Brazila Ĉambro de la Lingvo Internacia Esperanto

**B**razila Ĉambro de la Lingvo Internacia Esperanto estas ne profitema institucio, kies misio estas labori por la enkonduko de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto en brazilan



socion, kiu agnoskas Esperanton kiel la plej bona lingvodemokratia solvo por internaciaj rilatoj kaj kiel la plej bona ilo por protekti la lingvan diversecon. Kun sidejo en la ĉefurbo San-Paŭlo, la plej granda urbo kaj la plej granda negoco-centro de la suda planeda hemisfero, havanta kulturdiversecon raran en la mondo, Brazila Ĉambro de la Lingvo Internacia Esperanto laboras por kuraci la plej danĝeran flankan efekton de tutmondiĝo: detruon de kultura identeco de la popoloj pere de la detruo de iliaj lingvoj.

Laŭirante la evoluon de Esperanto en la mondo, Brazila Ĉambro de la Lingvo Internacia Esperanto ofertas al la brazilanoj la ekkonon de tiu lingvo kiu, pruvite, faciligas la lernadon de aliaj lingvoj.

Kontroli ĉe [www.cblie.org.br](http://www.cblie.org.br) pliajn informojn kaj profitu la okazaĵon por koni plifunde tiun gravegan institucion por esperanta movado. ★

**MANOEL BLAZ GARCIA (1928/2012)** naskiĝis en Sorocaba, São Paulo, la 23-an de sep-



Manoel Blaz Garcia, la malplej alta.

tembro 1928, kaj forpasis en la sama urbo la 15-an de aŭgusto 2012. Li edziĝis kun Joaquina Martinez Blaz kaj ili havis tri gefilojn: Roberto Blaz Martinez, Edison kaj Ida Magali. Li diplomiĝis pri Praktikaj Artoj, en 1974, ĉe Fakultato pri Filozofio, Sciencoj kaj Beletro de Sorocaba, laboris en kelkaj industrioj (kiel oficisto, laboristo) kaj emeritiĝis kiel simpla ŝtatoficisto de Ĝenerala Jurdepartemento.

Manoel Blaz Garcia esperantistiĝis en la 1950-jaroj kaj de tiam multe laboradis favore Esperanton. Li instruis nian lingvon, fervore disvastigis ĝin kaj prezentis radio-programon "Clube de Esperanto" (Klubo de Esperanto) ekde 1965 (dum 47 jaroj), per la Radio Boa Nova, el Sorocaba. Li kunfondis Sorokaba Esperanto-Klubo en la 21-a de majo 1967 kaj estis Delegito kaj Faka Delegito (homeopatio kaj spiritismo) de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Manoel estis vere agema kaj sindediĉa esperantisto kaj varbis al Esperanto multe da homoj. Li estis la unua instruisto de José Carlos Dorini Ramos, eminenta samideano loĝanta en Braziljo, kiu okupis kelkajn postenojn en la estraro de BEL kaj ankoraŭ volontulas ĉe la sidejo de nia institucio.

Li disvastigis ankaŭ homeopation kaj verkis en portugala lingvo la libron "HOMEOPATIO, UMA TERAPIA PRÁTICA E SUAVE NO LAR", eldonita en 2005.

Manoel Blaz Garcia, fervora esperantisto, verŝis en multajn korojn sian entuziasmon pri nia movado. Pri lia morto, Eluizio Bueno Rodrigues skribis interrete la jenon: **"Forpasis last-nokte al la pli granda mondo la pioniro de la E-movado en Sorocaba, Manoel Blaz Garcia. Li konkludis sian mision sur la tera krusto. Ni esperu, ke li daŭrigu ĝin en la nova biodimensio, kie li pluvivos, kun la sama vervo. La laboro ne povas ĉesi."**

**EDMO RODRIGUES LUTTERBACH (1931/2011)** naskiĝis en Rio de Janeiro en 1931 kaj forpasis la 27-an de septembro 2011 en Niteroi, Rio de Janeiro, kelkajn tagojn antaŭ sia okdekjariĝo. Li, kiu estis verkisto kaj membro de "Academia Fluminense de Letras", esperantistiĝis sub influo de la paro Neide Barros Rego kaj Walmir Ventura Rego. Li faris bazan kurson private kun Aloísio Sartorato kaj ekde tiam li ĉiam partoprenis en brazilaj kongresoj de Esperanto kune kun siaj geamikoj Walmir kaj Neide. Li iĝis konsilanto de Niteroi Esperanto-Klubo kaj regule partoprenis la kunsidojn kaj eventojn de NITEK.

Li diplomiĝis pri Juro en 1960 kaj doktoriĝis en 1964. Dum kelkaj jaroj li advokatis, kaj en 1965, per konkurso, fariĝis ŝtata akuzisto kaj restis en la jura kariero ĝis emeritiĝo en 1995.

Li multe verkis pri juro, historio, portugala literaturo kaj biografioj. Li estis poeto kaj interalie verkis la poemon "Sur la plaĝo sen ŝi", kiu troviĝas en "Brazila Esperanta Parnaso", libro organizita de Sylla Chaves kaj Neide Barros Rego. ★


# Financa Raporto

## COMUNICADO


### PARECER DOS CONSELHOS FEDERATIVO E FISCAL, DA LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO


Os Conselhos Federativo e Fiscal da Liga Brasileira de Esperanto (LBE), no uso de suas atribuições explicitadas no parágrafo único do art. 17 do Estatuto da LBE, pelas quais devem deliberar sobre as contas da Liga, no ano em que não for realizado Congresso Brasileiro de Esperanto, com fundamento nesse dispositivo estatutário e no que foi resolvido na Assembleia realizada no Congresso Brasileiro de Esperanto em janeiro de 2012 na cidade de Taguatinga – DF, à vista das Demonstrações Contábeis publicadas na Revista Brazila Esperantisto no segundo e terceiro trimestres de 2012, relativas ao exercício findo em 31 de dezembro de 2011 e do respectivo exame, decidiram pela emissão do presente parecer sobre as atividades dessa Instituição e suas contas no ano em referência, manifestando-se pela aprovação das presentes contas.

Brasília-DF, 09/04/2012

  
\_\_\_\_\_  
Maria das Dores Góes  
Presidente do Conselho Federativo\*

  
\_\_\_\_\_  
Adolpho de Miranda Silva  
Conselheiro

  
\_\_\_\_\_  
Aymoré Vaz Pinto  
Conselheiro

  
\_\_\_\_\_  
José Carlos Dorini Ramos  
Conselheiro

\* Nota explicativa: 30 (trinta) dias após a divulgação das presentes Demonstrações Contábeis na Revista Brazila Esperantisto do terceiro trimestre de 2012 sem novas manifestações, as presentes contas ficarão entendidas como definitivamente aprovadas, à luz do Estatuto da Liga Brasileira de Esperanto.

# Esperanto

Lingvo Internacia

**48-a Brazilia Kongreso de Esperanto – BKE**

**33-a Brazilia Esperantista Junulara Kongreso - BEJK**

**11-a Brazilia Infana Kongreso de Esperanto - BIKE**

**Internacia Festivalo de la Esperanto-kanzono**

**Internacia Kinovidea Festivalo**

**Brazilia Geodezia Centro**

**Grande Barra, 18 - 22 Januaro 2013**

**Barra de Garças-ME, Pontal de Araguá-MT kaj Aragarças-GO**

**CEFEMO**

**Esperanto, Kulturo kaj Turismo:  
Alternativoj por Verda Ekonomio.**



**ALFROU**

**Brazilia Esperanta Ligo - BEL**

102 - 88, Yndira St. Sala 201 - 72013-900 - Brasília DF  
Tel.: +55 61 32424 524 - Fax: +55 61 3242 4244  
[www.braziliaesperanto.org.br](http://www.braziliaesperanto.org.br)

**INDIOKAZO**

**Internacia Kongreso de Esperanto kaj Indioj - IKIE**

**Por la 100-a (100-100) - 100-100 - 100-100 - 100-100**

**Revista Esperanta - Via, Santa Helena**

06300-000 - Barra de Garças-MT

TELEFONO: +55 35 327272 - FAX: 327272 - 327272

TEL.: +55 35 327272 - FAX: 327272 - 327272

[www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br) - [www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br)

Indioj kaj Esperanto - 100-100 - 100-100

[www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br) - [www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br)

[www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br) - [www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br)



**ORGANIZADO**  
Indioj kaj Esperanto - 100-100 - 100-100 - 100-100  
Revista Esperanta - Via, Santa Helena  
06300-000 - Barra de Garças-MT  
TELEFONO: +55 35 327272 - FAX: 327272 - 327272  
[www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br) - [www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br)

**ORGANIZADO**  
Indioj kaj Esperanto - 100-100 - 100-100 - 100-100  
Revista Esperanta - Via, Santa Helena  
06300-000 - Barra de Garças-MT  
TELEFONO: +55 35 327272 - FAX: 327272 - 327272  
[www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br) - [www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br)

**ORGANIZADO**  
Indioj kaj Esperanto - 100-100 - 100-100 - 100-100  
Revista Esperanta - Via, Santa Helena  
06300-000 - Barra de Garças-MT  
TELEFONO: +55 35 327272 - FAX: 327272 - 327272  
[www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br) - [www.indioj.org.br](http://www.indioj.org.br)

